# Ho Di', Sinjor', Vi estis Reĝ'

## אדון עולם אשר מלך

## ADON 'OLAM AŜER MALAĤ – ADORU 167




3. Sen fin', mezur', kaj sen komenc'
   kaj unu-nura, sen kunul',
   Vi regas mondon per potenc'
   de leĝo-dono kaj regul'.

4. Savonto nia el ekzil',
   apogo dum homara plag',
   Vi estas mia sav-azil'
   kaj mia Sort' kaj mia Flag'.

5. Animon mian je premi'
   Vi nokte prenas por protekt',
   kaj tial revekiĝas mi
   al viv', sen tim' kaj sen difekt'.

אדון עולם אשר מלך • ADON 'OLAM AŜER MALAĤ • M: tradicia, sefarda • hebrea T: anonima, 14a jarcento • E: Josef Kohen-Cedek, Jerusalemo • TK 123 • 2001 en ADORU 167